Reprezentantoj de ĉiuj tri regionoj studis la israelan modernigon de la hebrea kaj ĝiajn progresajn instruajn programojn por helpi efektivigi la leĝdonajn kaj edukajn reformojn. Rezulte ili pliigis scion de la kimra en 1993 per postulo, ke en ĉiuj partoj de Kimrujo ambaŭ la angla kaj la kimra estu traktataj egale en publikaj aferoj. Ili starigis la katalunan kiel lingvon de instruado en publikaj lernejoj en Katalunujo, kie la kastilia hispana (perceptita eksterlande kiel la sola nacia lingvo de Hispanujo) estas la “deviga fremdlingva postulo”.

Kimro, kiu elektas voĉdoni por *Plaid Cymru* (la kimra naciisma partio), disputos kun siaj samlandanoj – el kiuj nur kvinono parolas la kimran lingvon flue – ke, sen nacia sendependiĝo, la kimra kulturo estos kondamnita velki fronte al daŭra anglalingva regado de Britujo.

Tamen la populareco de la kulturaj festivaloj *Eisteddfod*, la daŭra sukceso kaj allogo de viraj korusoj, la kresko de paralela kimra bazlerneja sistemo, la sukceso de kimralingva televido, ĉiuj aŭguras bone por la postvivado de tio, kio faras Kimrujon distinga kaj konsciigas eĉ ne-kimrajn parolantojn, ke la kimra kultura kaj historia heredaĵo vivas kaj povas pliriĉigi la vivon.

Ne hazarde, kimraj kaj eŭskaj naciistoj aparte simpatiis kun la revigligo de la hebrea. Ambaŭ grupoj asertas, ke sia lingvo estas la “plej malnova en Eŭropo” kaj ke la postvivado de nacio estas intime ligita kun la konservado kaj florado de “nacia lingvo”.

Tial la katalunoj tiel furioze kontraŭis la ideon, ke ili devas konsideri sin antaŭ ĉio “hispanoj” pro tio, ke ili estas civitanoj de Hispanujo. Kompreneblas, ke en sia propra patrujo ili havu prioritaton. Katalunoj fieras pri siaj gloraj artistoj kaj pentristoj kiel Gaudí kaj Dalí, kaj indignas pri eksterlandanoj, kiuj nomas ilin simple “hispanoj”.

En 1957, la israela kultura konsulo en Parizo, S. LEVINE, ricevis konfidencan leteron de grupo de eŭskaj intelektuloj ankoraŭ en la subtera kontraŭfrankisma movado petante konsilojn pri kiel efektivigi la ulpanajn metodojn. Kaj katalunaj kaj eŭskaj naciistoj plejparte subtenis la respublikon

dum la interpopola milito kaj estis diskriminaciitaj de la frankisma reĝimo, kiu haltigis preskaŭ ĉiujn publikajn agadojn kaj kulturajn eventojn en tiuj lingvoj dum la sekvaj dudek kvin jaroj. Pro la fakto, ke la kataluna estas sufiĉe proksima al Esperanto, la reĝimo ankaŭ rigardis ĝin kiel pretekston por atente rigardi kontraŭulojn.

## La novgreka (demotika) kaj turka lingvoj

La modernaj naciismaj movadoj en Grekujo kaj Turkujo ambaŭ komencis revigligon de siaj respektivaj lingvoj, farante la lingvojn pli ĝisdataj kaj liberaj de fremdaj influoj. Laŭ tiuj movadoj, “vera nacia lingvo” devas akiri favoron de la komunaj homoj malproksimaj de la establitaj klasikaj literaturaj versioj preferataj de fakuloj, la greka eklezio, kaj la otomanaj burokratoj. Ĉi-lastaj asimilis ornamitajn literaturajn esprimojn persajn, kaj konservis la malkonvenan kaj maloportunan araban skribon. Lingvistoj kaj fakuloj simpatiaj al moderna naciismo en ambaŭ landoj trovis solvon, kiu favoris modernan kaj simpligitan lingvon. Kiel la moderna hebrea, tiuj lingvaj projektoj estis rigardataj kiel ŝtate direktitaj entreprenoj, destinitaj por pliiĝi senton de solidareco kaj kohereco, kunigi klasojn, diversajn sociajn tavolojn, enmigrintojn, kaj malplimultojn, aŭ malpliiĝi regionan diversecon.

## La hebrea kaj Esperanto – la miraklaj paraleloj

Esperanto, la sola sukcesa elpensita lingvo, ŝuldas grandan parton de siaj origino kaj sukceso al la respondo al la juda lingva demando. Ĝia kreinto D-ro Lazar Ludwig ZAMENHOF estis judo, kies scio pri la hebrea sendube ludis gravan rolon en lia serĉado de universala lingvo. Kvankam la Esperanta vortprovizo

plejparte devenas de la latinidaj, ĝermanaj kaj slavaj familioj, estas certe, ke la profunda scio de Zamenhof pri la hebrea kontribuis al la logika strukturo de Esperanto.

Tio estis dutranĉa glavo. Komence, jidistoj argumentis kontraŭ la moderna hebrea, komparante ĝin kun “la artefarita karaktero” de Esperanto.” Kaj Zamenhof kaj Ben-Yehuda rigardis la problemon de juda identeco kiel neapartigeblan de la lingva demando. La vizio de Ben-Yehuda temigis la revigliĝon de la hebrea kiel antaŭkondiĉo por juda nacia renaskiĝo. Diverstempe ankaŭ Zamenhof konsideris la ideon revivigi la hebrean kaj la uzon de la latina alfabeto por la jida. Li finfine malakceptis ambaŭ solvojn favore al neŭtrala internacia lingvo. Li esperis, ke tiu lingvo samtempe estos uzata kiel komuna juda kaj universala lingvo.

Ekzistas konsiderinda konjektado pri rektaj kaj nerektaj pruntoj al Esperanto de elementoj el la hebrea, kiuj povas esti nur koncize traktitaj ĉi tie (eble en estonta artikolo), sed ĝi malkaŝas multon pri la logika mensostato de Zamenhof. La sukceso de Esperanto stimulis kulturen agadon de multaj instruistoj, verkistoj kaj poetoj inter parolantoj de “malgrandaj lingvoj.” La hebrea vorto “ulpan”, kiu signifas intensan lernadon de la parolita hebrea, estas adoptita por similaj lernejoj en la gaela (skota) lingvo.



**Norman BERDICHEVSKY**

Norman estas veterana esperantisto kiu aktivadis en Usono, Israelo, Hispanujo, kaj Danujo. Post multaj jaroj en Florido instruante ĉe UCF, li nun loĝas en Britujo por esti pli proksima al siaj filoj kaj nepoj.

**normberd@gmail.com**

# ESP-Disk' kaj Esperanto

historie • Steve EICHLATT



**V**i probable ne scias, ke Esperanto ludis signifan rolon en la disvolviĝo de **libera ĵazo** <<https://bit.ly/3a56AUK>>. Libera ĵazo, kiu aperis meze de la 1960-aj jaroj, estas multe malpli rigida kaj strukturita ol aliaj ĝenroj de muziko, inkluzive de aliaj specoj de ĵazo. Iuj eble nomus ĝin ne “muziko” sed “bruo”, ĉar mankas en ĝi la belsonaj formoj ofte trovitaj en aliaj muzikstiloj. Tamen, kiom mankas la belsonaj formoj, tiom ĝi kapablas esprimi realajn, kompleksajn emociojn.

Pro la strangeco de libera ĵazo kaj ĝia tuta manko de komerca valoro, neniu diskeldonejo krom unu interesiĝis pri ĝi. Ekde ĝia fondiĝo en 1963, **ESP-Disk'** <<https://espdisk.com>> estis la ĉefa diskeldonejo por artistoj kiel Albert AYLER, Giuseppe LOGAN, Sun RA, Ornette COLEMAN, Paul BLEY, kaj multaj aliaj (vizitu ĉi tiun **Spotify-ludliston** <<https://spoti.fi/3xZuSA>> por aŭskulti iom de la muziko de ESP-Disk'). Verŝajne ne estas troigo diri, ke se ESP-Disk' ne estus registrinta la muzikon de tiuj artistoj, granda parto de la libera ĵazo mankus al historio. La literoj “ESP” en la nomo indikis – kaj la apostrofo konfirmis – ligon inter tiu nova stilo de ĵazo kaj la internacia lingvo, Esperanto. La historio de ESP-Disk', ĝia fondinto Bernard STOLLMAN, kaj multaj el la ESP-artistoj estas priskribita en la libro *Always in Trouble: An Oral History of the Most Outrageous Record Label in America* de Jason Weiss, kiu aperis en 2012.

Stollman, la plej maljuna el sep infanoj, elkreskis en


Plattsburgh, Novjorkio. Liaj gepatroj, judaj enmigrintoj el Pollando, kreis ĉenon de vestbutikoj tra la ŝtato. Bernard studis juron ĉe la universitato Columbia, kaj poste, kiel novjorka advokato en la fruaj 1960-aj jaroj, li renkontis plurajn eminentajn ĵazistajn klientojn. Stollman ofte helpis tiujn klientojn kaj iliajn familiojn, eĉ senpage, do li rapide akiris ilian konfidon. Stollman mem neniam estis ĵazspertulo. Tamen li sentis instinktan allogon al libera ĵazo. “Mi tre rapide konsciis, ke tiuj homoj estas spirite profundaj. Ili ne estis amuzistoj – ili estis komponistoj kaj artistoj, kaj ilia muziko estis ĉio por ili. Mi ekkonsciis tiun seriozecon. Mi nutris min per ĝi. Mi trovis bezonon por plenumi.”

Kvankam ESP-Disk' estas nun precipe konata kiel eldonejo por libera ĵazo, ĝi registris tre diversajn stilojn. Ĝiaj artistoj inkluzivas *The Fugs*, *The Godz*, *The Holy Modal Rounders*, *Pearls Before Swine*, Patty WATERS, kaj la faman inkaan kantistinon Yma SUMAC. Estis ankaŭ diskoj kun paroladoj de verkistoj William BURROUGHS kaj Timothy LEARY. La fadeno kiu konektas ĉiujn ESP-diskojn esprimiĝas per du proklamoj presitaj sur ĉiu kovrilo: *You never heard such sounds in your life* (“Vi neniam antaŭe dum via vivo aŭdis sonojn tiajn”) kaj *The artists alone decide what you will hear on their ESP-Disk'* (“Sole la artistoj decidas, kion vi aŭdos en ties ESP-Disk'”).

Verŝajne la plej surpriza artisto aperinta en tiuj diskoj estis la murdisto Charles MANSON. Manson registris diskon en 1967, antaŭ la fifamaj krimoj, ĉe la studio de Dennis WILSON de *The Beach Boys*. Stollman aŭdis pri la disko post kiam okazis la krimoj, kaj elektis distribui ĝin. Laŭ li, Manson estis kaj viktimo kaj krimulo. “Mi opinas, ke la registaro uzis la procesadon [de Manson] por misfamigi la hipian movadon pro ĝia opozicio al la milito en Vjetnamujo.” Li daŭrigis: “Mi neniel subtenis lian konduton, kaj mi supozis, ke verŝajne li kaj ‘la Familio’ multe komercis per kokaino. Tiuj murdoj estis karakterizaj de fiaskintaj kokain-negocoj ... tamen tio neniam menciigis dum la proceso, ĉar enmiksigis en la afero tro multe da famaj nomoj.” Interesa teorio, sendube! Menciindas, ke profitoj de la Manson-disko estas pagataj al la familioj de la viktimoj.



Antaŭ la kreo de ESP-Disk', Stollman interesiĝis pri Esperanto. En 1963 li ĉeestis la Landan Kongreson de ELNA en Pittsburgh. Duncan CHARTERS, kiu ĉeestis tiun kongreson, memoras: "Ĝi estis ege sukcesa kongreso, kun partopreno de la urbestro. Ĝin organizis ĉefe Frans JAHGER, dana enmigrinto kaj aktivulo, kiu kun gitaro kantis kaj kantigis simplajn kantojn por gajigi grupojn de esperantistoj. Tiuj reliefiĝis en bankeda programo de la kongreso." Dum la kongreso, Charters "proponis por mi la unuan publikan version de [humura skeĉo] 'Mia eskterlanda vojaĝo', kiun mi kopiis de prezentaĵo de John WELLS en la londona Esperanto-kabaredo."



Stollman aŭskultis tiun prezenton kaj plurfoje la kantojn de Jahger. "Do li ekhavis la ideon krei diskon kun tiu enhavo, plus la traduko de 'Babi Jar' de lia amiko, pola tradukisto kaj esperantisto Julius (Yul) BALBIN", rakontis Charters. "Ni iris al studio ... kaj tre rapide, laŭ la posta stilo de Bernard por registrado de muzikistoj, faris ĉion preskaŭ sen la bezono ion refari, do en mallonga tempo por eviti altajn studiokostojn. Bernard jam havis ĉiujn necesajn kontaktojn en 1963, kaj post la kreo de la disko, li sciis ke li havos la kapablon krei entreprenon por vendi diskojn de la muzikistoj kiujn li estis konanta en Novjorko."

Tiu disko, *Ni Kantu en Esperanto*, fariĝis en 1963 la plej unua disko de ESP-Disk'. Charters diras: "estis sufiĉe da intereso por vendi minimume kelkcent, efektive pli ol la produktado de multaj el liaj aliaj


diskoj, do la akcepto kredeble kuraĝigis lin ĉar li povis iniciati la projekton, rapide ĝin konkludi, produkti preskaŭ tuj la diskojn, kaj vendi sufiĉajn por montri ke ekzistas malgranda merkato kiu povus ion enspezigi rezulte." Do *Ni Kantu* estis sukcesa provaĵo por la ideo de Stollman krei diskeldonejon, danke al la subteno de Esperantujo!

Charters klarigis al Bernard, ke li "iom malemis registri la skeĉon por la disko ĉar ĝia estis originalo de John Wells, kaj mi petis ke li minimume indikution sur la kovrilo. Bernard diris ke tute ne estas problemo ke mi faras tion, kaj poste forgesis aŭ ne volis aldoni la nomon de John Wells al la priskribo sur la disko, kio kaŭzis postan embarason al mi, aparte pro la reago de John!" Aj!

*Ni Kantu en Esperanto* estis tiel unika kaj nekutima kiel ĉiuj sekvantaj ESP-diskoj. Ĝi estis unu el manpleno da Esperantaj diskoj haveblaj tiutempe. "Bernard estis iusence pioniro, kiu montris la vojon al la sukcesoj de centoj da Esperanto-artistoj poste. Dum jardekoj oni petegis reeldonon de la disko, do supozeble la apero de la KD kontentigis tiun deziron." (La enhavo de la disko estas nun trovebla rete ĉe **Spotify** <<https://spoti.fi/3gPEv3V>> kaj **YouTube** <<https://youtu.be/Wwic8eP5DUM>>.)

Neniam sekvis dua Esperanto disko de ESP-Disk'. Laŭ Charters, Stollman "deziris produkti pli da diskoj en Esperanto, sed simple ne ekzistis aliaj ebloj en Usono tiutempe. Li pensis pri serĉado de muzikgrupoj en Eŭropo, sed tio neniam efektiviĝis. Lian revon eldoni muzikon en Esperanto fine transprenis Vinilkosmo. Tiu unua disko jam elĉerpis la eblojn de niaj talentoj, do li ne petis nin fari duan! ... Li klopodis kontaktiĝi kun la organizantoj de la koncertvojaĝo de *The Beatles* [en 1963], kaj kiel ĉiam, kun grandaj esperoj, tiukaze ke li konvinkos la grupon kanti almenaŭ unu kanton en Esperanto." Kia venko estus tio!

En la libro *Always in Trouble*, pluraj el la artistoj plendas, ke Stollman ne pagis ilin tiom, kiom li promesis. Jahger, Charters, kaj Balbin neniom ricevis por sia laboro pri *Ni Kantu*. Ili kontentiĝis pro apero de la disko mem, kaj ne atendis pagon. Du aferoj ŝajnas sendubaj, laŭ preskaŭ ĉiuj, kiuj konis Stollman: la diskoj de ESP-Disk' ne amase vendiĝis, kaj Stollman mem neniam havis multan monon.



Stollman lanĉis ESP-Disk'-on uzante monon de sia patrino. Sed post kvar jaroj, li jam ne havis sufiĉe por bone funkcii. En 1974, post eldonado de 125 diskoj, li fermis la firmaon pro tuta manko de mono. Li tiam ekhavis “realan postenon”: li fariĝis advokato por Novjorkio, kie li laboris dum 15 jaroj. En 2005, Stollman revivigis ESP-Disk'-on, reeldonante la pli fruajn diskojn en KD-formo, samtempe registrante novajn. La plej unua KD en la serio estis *Ni Kantu en Esperanto*.

Kvankam Stollman klare interesiĝis pri Esperanto, “li tamen neniam prenis la tempon por plene lerni ĝin, do multe preferis paroli en la angla, kiam eblis”, memoras Charters. Samtempe “lia koncepto pri la valoro de Esperanto estis vasta.”

Legante *Always in Trouble*, oni sentas ke Stollman

estis ĝenerale kompatema, helpema homo. Multaj el la artistoj rakontas, ke Stollman gastigis ilin ĉe sia hejmo, kaj prezentis ilin al homoj, kiuj helpis iliajn karierojn. Charters rakontas, “Li certigis, ke mi havis lokon por loĝi en Novjorko kaj provizis sufiĉe da manĝoj, por ke mi ne malsatu, kiel preskaŭ okazis al mi en alia vizito ... Li ĉiam pretis helpi ĉiumaniere, persone, profesie, Esperante. Elstara ekzemplo por multaj, ne sukcesa en la kutima senco ĉar eĉ kiam mi vidis lin en 2009, li vivis je eta pensio kaj sociasekuro, en senmebla dormoĉambro (nur lito kaj seĝo), ĉar la enspezoj por la diskoj kaj KD-oj precize sufiĉis por pagi la kvar laborantojn, kun nenio pli por li mem.”

Dum la jardeko antaŭ sia forpaso en 2015, Stollman interesiĝis pri maŝintradukado. Li laboris kun Charters kaj aliaj por krei sistemon uzantan la ideon *Distributed Language Translation*, kiu utiligas Esperanton kiel interlingvon. Sed tio estas temo por alia artikolo!

ESP-Disk' estas precipe konata, tiom ke ĝi estas konata, por ĝia rolo en la disvastigo de libera ĵazo dum la 1960-aj jaroj. Kaj se neniam ekzistus ESP-Disk', signifa parto de la historio de muziko estus perdita. Esperantujo donis al ESP-Disk' ĝian unuan etan venkon, kaj tio donis al Stollman kuraĝon disvastigi muzikajn voĉojn, kiujn la mondo ankoraŭ ne pretis akcepti. Esperantujo havas longan historion de voĉoj, por kiuj la mondo ne pretas. Kvankam la sukceso de ESP-Disk' ne estas la fina venko, tamen tiaj etaj venkoj vivtenas nian esperon.



### Steve EICHBLATT

Steve loĝas en Novjorko kun sia edzino kaj filino. Li estas fizikisto, programisto kaj financisto. Li ŝatas legi, esplori la urbon, aŭskulti muzikon de Bob DYLAN, kaj esti kun

sia familio.

[steve.eichblatt@gmail.com](mailto:steve.eichblatt@gmail.com)

## Strange, sed vere

La rubriko *Strange, sed vere* prezentas mallongajn legaĵojn en facila Esperanto. Per vortoj de la Baza Radikaro Oficiala ni rakontas al vi strangajn novaĵojn el ĉirkaŭ la mondo. Se vorto ne estas trovebla en BRO, ni difinas ĝin. Vi povas trovi **senpagan BRO-vortaron rete** <<https://bit.ly/37UCCyb>>, aŭ mendi **paperan libron de UEA** <<https://bit.ly/34VCv3r>>.

## Al amiko nova ne fidu sen provo

En la urbo Williston, Norda Dakoto, oni akuzis viron pri kontraŭleĝa eniro kaj minacado. Li piedbate enrompis la ĉefpordon de la domo de iu, kun kiu li laboris. Kial? Laŭdire la kolego rifuzis akcepti liajn amikiĝ-petojn en Facebook.



“Akceptu mian amikiĝ-peton, aŭ mi murdos vin,” tekstis unu el la mesaĝoj, kiujn la kolego ricevis. La viro tamen asertas sian senkulpecon, kaj li aperos antaŭ loka tribunalo en Aprilo.

*(Laŭ raporto de The Smoking Gun, 2020-12-31.)*

### koleg/o

Ĉiu, kiu havas la saman oficon aŭ profesion, rigardata rilate al la aliaj. Samlaborejano, samlernejano, ktp.

### murdi

Intence mortigi.

## Kun edzo promenu, sed rimenon prete tenu

Pro la koronavirusa epidemio, la urbo Sherbrooke en Kebekio malpermesas al siaj loĝantoj iri eksteren post la 8-a horo posttagmeze. Estas tamen kelkaj esceptoj

al la regulo, ekzemple por tiuj, kiuj promeniĝas hundojn.



La 9-an de Januaro policanoj vidis, ke geedza paro promenas ekstere post la limhoru. La paro asertis, ke ili efektive obeas la leĝon, ĉar la edzino kondukis sian edzon per hundrimeno. La policanoj ne konvinkiĝis, tamen, kaj donis al la paro monpunon de \$1500. Tio okazis en la unua semajnfino de la novaj reguloj, kiam policanoj tra Kebekio donis monpunojn al pli ol 750 homoj.

*(laŭ raporto de CTV News, 2020-01-12.)*

## Dion fidu, sed sen seĝo ne sidu

Policanoj en la japana urbo Funabaŝi arestis dudek-sesaĝan viron pro priŝtelado de konstruataj domoj. La ŝtelisto estis elektema: ĉefe, li preferis necesejajn seĝojn.



Laŭdire la afero komenciĝis unu matenon en Oktobro, kiam konstruistoj rimarkis malaperon de neceseja seĝo, kiun ili ĵus instalis la antaŭan tagon. La misteraj malaperoj daŭris dum kelkaj monatoj, kaj entute malaperis dek du necesejaj seĝoj.

En Januaro la viro vendis tutnovan seĝon al loka brokantisto. Oni suspektis lin, kaj li konfesis la ŝtelojn. En lokaj amaskomunikiloj li fariĝis fifama; oni nomis lin “Dio de necesejoj”.

*(laŭ raporto en The Daily Mail, 2021-01-13)*

### arest/i

Kapti iun por malliberigi aŭ por submeti al juĝado.

# Purpurigi la vizaĝon de buĉsoldato

traduku! • HOSS FIROOZANIA

La rubriko *traduku!* prezentas al vi diversajn tradukdefiojn. En paraj numeroj aperas tekstoj en Esperanto por enangligi; en neparaj, tekstoj en la angla por elangligi.

Leginte viajn respondojn ni prezentos resumon de la diversaj provoj kune kun niaj reagoj, komentoj, kaj proponoj.


**E**n tiu ĉi numero ni revizitas la defion el *Neologisme* kiu aperis en N<sup>o</sup> 2020:6. Mi kore dankas al AJ, BS, CL, MH, RN, kaj ZK pro iliaj lertaj kaj bone elpensitaj enangligoj.

Kelkaj tradukintoj sendis ankaŭ tre pensigajn rimarkojn kaj demandojn pri la teksto. Ofta temo estis la interpunkciaj kutimoj de la aŭtoro. Ekzemple, iu demandis:

Kiom vi emas respekti interpunkcion? La Lorjak-a eltiraĵo havas tre strangan interpunkcion (tro multe da punktoj, komoj, ktp). Ĉu tradukante vi emus ŝanĝi la interpunkcion por igi la tekston soni pli "glate", aŭ ĉu vi emus respekti la "efikon" de la troaj paŭzoj en la originalo?

Interpunkcio estas ĉiama defio. Inter Esperantaj verkoj la konvencioj diferencas pro manko de forta normo en Esperanto, kaj pro la diversaj nacilingvaj influoj sur la verkintoj. Persone, mi emas respekti la originalajn interpunkciojn nur tiom, kiom ili ŝajnas gravaj al la impreso celita de la verkinto. Kompreneble, sen ebleco konsiliĝi kun la verkinto, eblas nur konjekti pri ties celo! Sed ĝenerale, ĉar interpunkcioj en Esperanto estas pli abundaj ol en la angla, mi sentas liberon ŝanĝi ilin kiam ili ŝajnas nur afero de lingva aŭ aŭtora kutimo.

Alia tradukinto sendis pli ĝeneralan rimarkon pri fideleco, tuŝante eble la plej kernan dilemon de literatura tradukado:



La romano *Neologisme* (1975) de Jacques-Louis MAHÉ, alinome "Lorjak".

Mi vidas, ke multaj esperantistoj kaj aliaj tradukistoj kredas, ke ili havas "tradukistan rajton". Sed kiam oni ŝanĝas la ideojn de la aŭtoro, oni reverkas la originalan! Kompreneble, ne ĉio tradukiĝas laŭvorte, sed la celo estu traduki la penson kaj ne ornami ĝin.

Tute prave. Fidela tradukanto strebas nur redoni la aŭtorajn pensojn sen aldoni ion novan. Sed kiel scii, precize, kion la aŭtoro pensis? Ofte tiuj pensoj troviĝas ne en la vortoj mem, sed en la kromsignifoj, la kulture specifaj aludoj, la stilo, la kunteksto. Do tio, kio ŝajnas balasta ornamaĵo al unu tradukanto, povas ŝajni tute esenca al alia.

Finfine, aparte plaĉis al mi rimarko de unu tradukinto pri la trompa simpleco de tradukarto: "Tradukado estas frakta: ju pli detale oni ekzamenas tekston, des pli detale ĝi aspektas ..."

Nu, ek al la defio! Ĉiuj tradukintoj sukcese redonis la signifojn de la vortoj, sed pli interesaj estis iliaj streboj kapti la tonon – ekzemple la etoson de stereotipe burokrata firmao, aŭ la formalecon kaj prudan skandaliĝon de la prezidanto kaj lia servomiena helpanto. Jen kelkaj frazoj kaj esprimoj, kie oni proponis malsamajn solvojn:

**La prezidanto** — Preskaŭ ĉiuj elektis *president*, ekvivalenton tre trafan en pluraj kunteksto. Sed ĉu ankaŭ en firmaa oficejo? Plej plaĉis al mi la propono de CL, *chairman*.

**profesia fuŝeco** — Por traduki la adjektivon oni plejparte uzis *professional*, sed ĉe la substantivo la proponoj diverĝis: *disruption*, *ineptitude*, *bungling*, *mishaps*, kaj *incompetence*. Unu proponis ankaŭ *workplace misconduct*, plaĉe burokratecan esprimon. Kiun elektus troserioza prezidanto de firmao?

**superece ignoras la hortabelon de siaj deĵoroj** — *loftily ignores office hours*; *specializes in ignoring her scheduled work hours*; kaj *haughtily/arrogantly ignores her work schedule*. ZK havis tre interesan proponon: *regularly blows off her shifts*. Tre bona idiomaĵo ĉi-kuntekste, sed ĉu eble tro moderna kaj

neformala?

**ŝajnas kore taski akumulon da katastrofoj** —

Kiel redoni tiel densan esprimon sen perdi ĝian koncizecon? La tradukintoj baraktis brave, proponante: *wholeheartedly accumulates catastrophes; enthusiastically generates a plethora of catastrophes; works at accumulating disasters*, kaj simile. ZK proponis allogan revortumon: *sees disaster as her duty*.

Laŭ mia kompreno, la ideo estas ne nur tio, ke la fraŭlino kreas multajn katastrofojn, sed ke ŝi efektive trudas ilin al aliaj (ĉar ŝi mem ne solvos ilin). BS kaj AJ ŝajne celis tiujn ideojn per *leaves behind a pile of problems to fix* kaj *wholeheartedly ordains a heap of calamities*.

**fumas pli ol malnova lokomotivo** —

Kiel rimarkis CL, oni malofte vidas fumantajn lokomotivojn nuntempe, sed eble ili estis pli konataj en la 70-aj jaroj, kiam la rakonto supozeble okazas. Kelkaj tradukintoj redonis la komparon pli-malpli rekte: *she smokes more than a(n old) locomotive/train/freight train*. Alia elektis eble pli pretan metoforon: *like a furnace*. Por mi, la plej kutima esprimo estas *smokes like a chimney* (RN).

**farbas la vizaĝon kiel publikulino** — La angla havas impone ampleksan vortkolekton por inaj publikuloj, sed interese (kaj ne surprize?) ne por la viraj. Oni proponis: *prostitute, lady of the evening, whore, harlot*, kaj la tre amuze eksmodan *strumpet* (CL).

**purpurigus la vizaĝon de buĉosoldato** — Jen alia okazo kie ekzistas tre preta kaj trafa ekvivalento en la angla: *would make a sailor blush* (ZK). Aliaj tradukintoj provis resti fidela al la soldata aludo per (*front-line*) *soldier* kaj *infantryman*.

Leviĝas demando pri metafora freŝeco: serĉante kiel eble plej “nature” lingvaĵon, oni ĉiam riskas turni sin al gurditaj esprimoj, kiuj impresas malpli forte ol la originaloj. CL provis eviti tiun problemon uzante ne soldatojn, sed *Attila the Hun*.

**streĉis siajn fortojn** — *steadied himself; gave it his best; summoned/gathered his courage/strength; kaj spoke with effort*.

**promenas onidiraĵoj** — Anglalingvaj onidiroj malofte promenas, marŝas, aŭ alimaniere ekskursas, sed ili foje rondiras. Oni proponis: *word is going around; there are rumors going around; kaj rumors are circulating*.

**nenion el rekta fonto** — Tiel Polimiop raportas, ke lia informo estas nur onidira. La tradukintoj proponis: *direct from the source; from the horse's mouth; a proper source; kaj first-hand knowledge*.

**laŭ babiltruoj** — Kelkaj tradukintoj imagis klaĉemajn buŝojn, redonante *chatterboxes* kaj *yap-holes*. Aliaj imagis figurajn truojn por peri onidirojn: *according to the rumors; the scuttlebutt has it; kaj through the grapevine*.

**Burleska ideo!** — Tiel respondas la prezidanto, eksciinte pri la skandala tatuado. Laŭdifine, *burleska* afero estas absurda, ekstravagance komika, aŭ triviale parodia. Inter la proponoj estis *Scandalous!; Such mockery!; kaj variantoj de What a ridiculous notion! kaj An outrageous idea!*

**plena je konfuzego** — Tiel la aŭtoro priskribis s-ron Polimiop, kiam li malvolonte (kaj embarase) raportas la lokon de la tatuado. Unu tradukinto rimarkis, ke la vorto *konfuzego* ŝajnas iom stranga aŭ eĉ misa ĉi tie. Polimiop certe povas distingi inter aferoj, do ĉu li vere estas plena je *konfuzo*? Figure, la vorto indikas perdon de trankvileco pro io neatendita – tamen eĉ tiu ideo ne tute konvenas. La maltrankvilon ne kaŭzas io neatendita; ĝin kaŭzas embaraso kaj peno raportiti ion malpudoran.

Nu, eble ni simple harfendas. Aŭ eble Lorjak estis trompita de falsa amiko. En la franca, lia gepatra lingvo, *confus* signifas ne nur “konfuzita” sed ankaŭ “embarasita pro pudoro”. (Karaj franclingvanoj, bv. korekti se mi eraras!)

Ĉiuokaze, niaj tradukintoj strebis fidele redoni ambaŭ ideojn – kaj embarason kaj subitan maltrankvilon – jene: *completely bewildered; consterned; perturbed; kaj flustered*. Kelkaj tradukis pli libere kaj laŭkuntekste: *sheepish; utterly embarrassed*.

Leviĝas denove tiu demando pri verkista intenco. Foje, eĉ niaj plej talentaj verkistoj senintence streĉas vortsignifojn pro influo de la gepatra lingvo. Kiel scii, ĉu iu stranga vortelektio estas vere intenca, aŭ ĉu

erara?

**Mi estas tre ĝenata** — Polimiop denove baraktas elbuŝigi embarasan novaĵon. Oni traktis la frazon diversmaniere: *I am very embarrassed/troubled; I am quite uncomfortable; It's really shocking/rather embarrassing; kaj This is very awkward for me.*

**Tatuita ... sur ŝia postaĵo** — Per kiu vorto Polimiop finfine esprimus la koncernan korpoparton, se li parolus angle? Tradukante laŭ la vorta signifo, oni redonis *bottom* kaj *backside*; ambaŭ estas bonaj. Iom pli plaĉas al mi la elekto de AJ, *posterior*, per kiu Polimiop povus distancigi sin de la embarasa afero per pli formala kaj abstrakta termino. Ankaŭ *derrière* (MH kaj RN) ŝajnas tre trafa. Al anglalingvanoj, preskaŭ ĉio sonas pli elegante en la franca, ĉu ne? *Oh là là!*

Jen, finfine, provo krei sintezan tekston uzante la plej interesajn proponojn supre (kiel ĉiam, laŭ mia propra, arbitra kaj plene disputinda gusto), kun kelkaj etaj aldonoj:

The Chairman insisted: "Now see here, Polimiop. This situation is intolerable. Ever since she started here, that girl has demonstrated a singular talent for professional bungling: she cavalierly ignores her office hours, comes and goes as she pleases with no regard for the time, banter incessantly with her coworkers, makes fun of the clients, gossips, chatters, wanders the halls aimlessly, and does anything and everything but actual work. I suppose I should be almost grateful, since whenever she touches anything, she leaves behind a heap of problems to fix — scrambling files, jamming typewriters, losing documents, defacing important papers, and so on.

"What's more, her attitude is entirely inappropriate for a serious workplace — she smokes like a chimney, paints her face like a harlot, sits atop the desks, shamelessly flaunting her thighs in those outrageous miniskirts, tells stories that would make a sailor blush .... The scandal needs to end, now. We've already decided as much. So why is it still going on?"

Polimiop gathered his courage: "Well, Mr. Chairman, I'm afraid the matter isn't so simple. I've heard nothing first-hand, mind you, but there are

rumors going around, making it difficult to act too quickly. It's said that she keeps a portrait of one of our executives on her person at all times. Which executive, I wasn't able to determine. But through the grapevine, as it were, I hear the portrait may be a tattoo."

"How absurd! A tattoo? Where?"

The director seemed more flustered than ever. "Forgive me, Mr. Chairman, but I must be frank. This is rather difficult for me. The portrait is tattooed ... they say ... on her derrière."

Por tiuj, kiuj volas kompari la tradukojn kaj vidi ĉiujn detalojn, en la reta versio de la artikolo vi trovos paralelan prezenton de la tekstoj.



## La nova defio

Mi proponas la komencajn alineojn de *La tradukmaŝino*, amuza rakonteto de KONISI Gaku unue aperinta en lia sciencfikcia novelaro **Vage tra la dimensioj** <<https://bit.ly/3e9RtI7>> (1976):

Kun kontenta mieno li mergis sin en sofona, fajrigis cigaredon kaj elblovis rondan fumrington. Ĉio iris bone. Sur la tablo antaŭ li kuŝis nete tajpita manuskripto tradukita de lia TRADUK IKSO.

Li estis juna elektroinĝeniero. Dum unu jaro li enverŝadis siajn tutajn energion, talenton kaj konojn pri lingvoscienco kaj elektrotekniko en la konstruadon de tiu elektronika tradukmaŝino por Esperanto. Nun ŝajnis al li, ke li certgrade sukcesis provizi la maŝinon per intelekta penspovo, artista sentemo kaj verva eltrovemo, t.e. per la ecoj bezonataj por traduki plej delikatajn esprimojn en beletraĵoj. Ĝi funkciis ambaŭ-direkte inter Esperanto kaj la nacia lingvo, kaj eĉ poemojn ĝi povis traduki kun rimoj.

Koncerne tradukmaŝinojn oni jam aŭdis pri kelkaj, sed lia inventista memfido asertis, ke lia TRADUK IKSO cedos al neniu alia kun sia fleksebla esprimkapablo. Okule sekvante la deformiĝantan fumfiguron, li ĝuis revii pri la gloro, kiun la inventaĵo alportos al li.

Ne por mongajno per patento li entreprenis tiun

inventon. Lia ambicio direktiĝis al pli nobla celo, nome, akiri famon kiel eminenta tradukisto en Esperanto. Fariĝi la dua Kabe aŭ alia Kalocsay estis lia delonga deziro.

La unua paŝo, per kiu li intencis ŝovi sin antaŭ la verdan publikon, estis la partopreno en la Belartaj Konkursoj de UEA. La manuskripto sur la tablo

estis ja destinita al tiu celo. La granda peno ĝisnuna devos esti kompensita per la "ora premio".

La redakcio (trovu la adreson en la kolofono) akceptos vian tradukon **ĝis la 15-a de Julio**. Ne necesas sendi plenan tradukon, se vi ne kapblas aŭ volas; ni akceptos ankaŭ fragmentojn. Sed ĉiukaze bonvolu sendi **nur unu** tradukon, ne plurajn diversajn provojn. Sukceson!

## Solvo de la enigmo en n-ro 2021:1

enigmo-solvoj

1	F	O	R	M		5	G	R	I	L		9	S	K	L	A	V				
14	U	N	U	A		15	R	E	M	I		16	A	V	A	R	E				
17	L	I	B	R		18	A	V	A	L		19	R	A	K	E	T				
20	M	A	L	S	E	21	K	I	G	I		22	D	R	E	N	I				
					23	A	R	I	D	A		24	F	I	D						
25	P	S	A	L	M						28	F	E	N	E	S	T	R			
32	L	I	K			33	E	K	S	T	E	R		37	K	U	R	I			
38	A	L	T			39	N	O	T	A	R	I	A		41	F	A	M			
42	T	A	O	S		43	M	A	R	M	A	P		45	E	H	E				
46	A	B	R	I	K	47	O	T				48	A	D	R	E	S				
					50	L	O	D			51	V	E	S	T	I					
54	S	O	L	E	N					57	K	A	N	T	I	S	T	O	J		
61	T	R	A	N	S					62	A	L	I	R			63	T	A	B	U
64	A	G	I	T	I					65	P	O	R	A			66	R	E	E	N
67	N	I	K	E	L					68	T	R	I	T			69	I	L	I	A

Jen la ĝusta solvo de la krucvortenigmo en N<sup>o</sup> 2021:1. Gratulon al la ĉi-foja gajninto en la lotumado, **Zerbie HYNSON**, kiu ricevos \$10-rabaton de la libroservo.

Dankojn kaj laŭrojn ankaŭ al niaj aliaj solvintoj: Rafa NOGUERAS, Arlyn KERR, Jerry G. JOHNSON, kaj Ellen EDDY.

## La vivo de Peĉjo

Ĥercoj • Timothy BORONCZYK




Teksto kaj ideo de Timoteo; desegnaĵoj de "Awesome Satyr". (Kaŝnomo, kompreneble. Timoteo klarigas, ke la artisto preferas resti anonima.)

# Seen on the Internet

el la arĥivo • Miko SLOPER

Twenty-five years ago, well before the rise of what we now call "social media," online forums were just entering popular consciousness. In issue 1996:2, Miko Sloper — a.k.a. "Georgo Bonvolo" in *Pasporto al la tuta mondo* and then director of ELNA's Central Office — introduced readers to Usenet, one of the first worldwide discussion forums. Like today's social media, it had plenty of lively debates about Esperanto.

Many people have wondered where all the excitement about the Internet comes from. They have heard some of the buzzwords, but not seen the medium in action. I would like to present a little example of how one corner of the Internet functions.



A part of the information trading hands electronically is in a form called the "Usenet" which is rather like a huge collection of magazines with greatly expanded "Letters to the Editor" columns. There are quick and complex interchanges with responses referring to earlier articles. These internal quotes are marked with | in the margin. Quotes-of-quotes are marked with || etc.

I hope that the following excerpts add an understanding of why Internet enthusiasts believe that computer-assisted communication has value. This kind of content can justify the seeming coolness of the medium.



From: elna@netcom.com (Esperanto League N America)  
Subject: Re: Bilingualism, a danger?

Mr XXX writes in a recent posting:

elna@netcom.com (Esperanto League N America) writes:

It would be much more efficient to instruct people in a neutral common language and then use that language for international application. In the context of computers/artificial intelligence, Esperanto is indeed considered a natural language.

Please quote one single article from a scientific Journal on language (i.e. Language, Natural Language and Linguistic Theory, Linguistic Inquiry,...) where it has been noted that native speakers of the "esperanto" language have been found.

I see no need to quote secondary sources; I personally know several children whose first language experience included Esperanto, and who are, by any normal use of the word, native speakers. This is a common phenomenon, easily verified by any who seek real information, rather than a priori hypotheses.

Esperanto is no "natural" language, it is an Utopian (albeit noble) game to create a new language from a few existing or dead indoeuropean languages. Of course, if you think that artificial languages are natural languages and that AI research has been able to model reasoning go ahead and publish your findings.

Again I request Mr XXX to do a bit of research before ranting. It is a completely ordinary dichotomy: natural vs artificial in AI [artificial intelligence] circles refers to the difference between spoken human intercourse vs machine code. It matters little whether the human side is represented by English, Chinese, Swahili, Latin, Esperanto or Navaho— it represents a class which is quite distinct from Cobol, Unix, C++, etc.

Yes, esperanto is an ARFITICIAL language, and NO it cannot be spoken universally because its base is Indoeuropean, thereby excluding 2/3 of the human population that speaks a non-indoeuropean toungue. Esperantists like this guy are so religious about their game that they have even come to believe that their toy is a natural phenomenon.

I hate to see a little thing like statistical fact interfere with a fine theory, but about half of the world's Esperantists are from a non-IE background, and seem to not let that interfere with their enthusiasm for and application of this international



language! Mr XXX again raises the propaganda ploy of "Esperanto as religion" which intends to obscure the straightforward arguments of its efficiency and political neutrality.

I claim that Esperanto is not significantly more or less natural than any other human language. \*NO\* language is natural. Speech is a human \*invention\*.

[You can see the lively interaction of objection & response, which cannot happen in most communication media. It is rather like talk-show radio in its two-way dialogue. Here is a follow-up conversation with the same writer as above. Notice that I have changed the name of the topic.]

From: elna@netcom.com (Esperanto League N America)  
Subject: Re: Monolingualism, a danger?

Mr XXX writes in a recent posting:

elna@netcom.com (Esperanto League N America) writes:

The difference between Esperanto and Swahili is that nobody \*planned\* swahili, and nobody speaks esperanto as a natural language. As a game, yes.

Time to do research, Mr XXX! Swahili \*is\* a planned language, as is Bahasa Indonesia, Hebrew and Esperanto. They all have different degrees of planning, to be sure, but they all have been influenced by conscious intention.

but it is already quite useful to anybody who travels and enjoys meeting the local people in many different countries.

Of course, just like joining a sect.

Mr XXX pulls another propaganda trick

out of his bag! There is no similarity to sects here-- this international language is a simple communication tool, like amateur radio or any national language: when a Greek travels to Australia, he contacts other Greeks-- is that a sect? When an amateur radio operator travels to Fiji, he contacts (and perhaps visits) the local radio enthusiasts-- is that a sect? When Esperanto speakers travel, they often visit other Esperanto speakers--what makes that a sect? It is a natural and appropriate application of this international language.

Esperanto is also an excellent language for reading news not filtered by national media; and literature translated into Esperanto retains much of the feel of the original, due to its flexibility.

Could you explain what you mean by "flexibility". You see, as a trained linguist, when someone starts using these modifiers to define language, I tend to blow a fuse...

Flexibility allows Esperanto to create large compound nouns to mimic the tendency of German or Hungarian, or to use a string of words to follow the normal style of French or Chinese. One can cast the verb to the end of a clause, as in German, or follow any of the standard forms of SVO, SOV, etc. The adjective can precede the noun, as in English, or follow, as in French. So by flexibility I mean that the paths of expression are bound by fewer rules, which allows Esperanto to adopt the structure (and therefore assume the flavor) of many other languages. A physical object which can take on many shapes is called flexible; I am sorry that this metaphor caused you a circuitry malfunction. :-)

# Monon

senintenca esperantaĵo • Francis LUGLIO



Francis LUGLIO trovis tiun ĉi riĉan ponton en Broad Ripple Village, Indianapolis. Dankon, Francis! (Ni ĉiam ĝojas ricevi monon.)

---

## Kolofono

Redaktoro / Editor: Hoss FIROOZANIA

**Kontaktu nin:** <bulteno@esperanto-usa.org>, aŭ:

Usona Esperantisto, c/o Hoss Firooznia  
CMC #271205, University of Rochester  
500 Joseph C. Wilson Blvd.  
Rochester NY 14627-1205  
United States of America

*Usona Esperantisto* estas la dumonata bulteno de Esperanto-USA. Bonvenaj estas kontribuoj kaj en Esperanto kaj en la angla. Prefere sendu materialojn retpoŝte, kaj aldonu viajn nomon, adreson kaj foton. Kun aliaj fotoj aldonu notojn pri datoj, lokoj, kaj nomoj de la foti(n)toj. Ni resendos poŝte senditajn materialojn se vi aldonas mem-adresitan, afrankitan koverton.

La enhavo de *Usona Esperantisto* estas reuzebla laŭ la permesilo CC BY-SA <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/2.0/deed.en>>. Ni petas, ke oni tamen atendu du monatojn antaŭ ol represi la plej freŝajn artikolojn.

Opinioj esprimitaj en *Usona Esperantisto* apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre spegulas vidpunktojn de la redaktoro aŭ de Esperanto-USA.

Kontribuontoj eble volus legi la kalendaron de limdatoj kaj redakciajn konvenciojn en nia retpaĝaro.



*Usona Esperantisto* ("American Esperantist") is the bi-monthly magazine of Esperanto-USA. We welcome contributions in both Esperanto and English. Please send materials by email if possible and include your name, address, and photo. With other photos please include the photographer's name along with subject(s), location, and date. We will return mailed contributions if you include a self-addressed, stamped envelope.

The contents of *Usona Esperantisto* may be reused under the Creative Commons Attribution-Share Alike license <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/3.0/>>. We ask that you wait two months before reprinting the latest content, however.

Opinions expressed in *Usona Esperantisto* are those of the individual authors and do not necessarily reflect the views of the editor or of Esperanto-USA.

Contributors may want to consult the submission calendar and style guide on our website.